

& Sinklarkanto:

< Rekante 13 el 41 batoj por strofo, entute 779 paŝoj dum 9 minutoj. Norda Kantaro #4460. Pri la batalo de Kringen la 26-an de aŭgusto 1612 en Kalmara Milito inter Danujo kaj Svedujo. Verkis Edvard Storm (1781). Melodio de feroa ĉendanco. El malnova dana tradukis Martin Strid (2014). Klarigoj (*): '1 Gudbrands dal, "Orfajra valo", estas norvega valo kaj provinco. '7 Romsdal, vala provinco inter Gudbrandsdal kaj la maro. '10 Fajroj avertaj bruliĝis sur montoj por signali pri eka danĝero. '12 Våge, Lessø kaj Lom estas parokoj. '13 Laŭgen estas la rivero en Gudbrandsdalo. '14 Nudulo, aŭ Nikso, mita homsimila estaĵo danĝera en rapidfluo.>

(#Melodio:

<:41> (/do Ti LaLa La La Ti do o;Ti LaTi do rere do TiTi; re do Ti LaLa La LaLa Ti do o;Ti LaTi do rere do TiTi;

(#Rekantaje: La do La Si i;La LaLa La LaTi do Ti i La a)

)×19)+

(&Strofoj:

'1 /Sinklar iris trans sala mar' ; li al Norvegujo direktus ; li trovis tombon en Gudbrand-rokar'* ; kaj frunto tuj sanga aspektos.

(×:; **Ek antaŭ tag'**, ; **ja venas ili trans sablejo.**)

'2 Ho Sinklar iris sur blua ond' ; por sve2da soldo batali ; Dio vin helpu, vi devos grondi ; en herbon pro norvego fali.

'3 Luno palas en nokta ven' ; trankvile la ondoj susuras ; el akvo levas sin siren' ; al Sinklar malbonon aŭguras.

'4 Returnu re, vi skota vir' ; vin temas ja vivpereen ; Norvegujen veninte, jen vera dir' ; neniam vi venos reen.

'5 Mave kantas vi, venena ogr;o ĉar malbonŝancon profetas, ; kaj se mi vin kaptos en manovr;o vin dishakigi mi pretas.

'6 Li velis tagojn, li velis tri ; kun si2a soldularo ; matenon kvaran, norveguja vid' ; ne volas mi veron bari.

'7 Al Romsdal-bordoj* lin portis vent' ; deklaris sin malamiko ; lin sekvis viroj mil kvarcent ; kun malbona celo implika.

'8 Profanan bruliron ili puŝis ; homojn ĉiujn malhonoris ; ilin aĝula senpovo ne tuŝis ; kaj kraĉis vidvinon en ploro.

'9 Mortiĝis bebo en panja sin' ; eĉ kvankam rideto suris ; sed famo pri ĉi mizera kulmin' ; al centro de l' lando kuris.

'10 Fajro flamis* kaj kuris mesaĝ' ; de unu al sekva najbaro ; ne fuĝis filoj de vala vilaĝ' ; devis pravigi Sinklaro.

'11 Soldato iris al reĝa milit' ; ni mem devas landon defendi ; krimbando estu malbenit' ; nun sangon malvolas atendi!

'12 Kampuloj de Voge, Lesej kaj Lum* ; kun akraj hakiloj sur kolo ; en Bredebojd' kunvenis dum ; kun skoto volis parolon.

'13 Sub deklivon apudpasas pad' ; ni povas je Kring indiki ; preterhastas Laŭgen-fluad'* ; en ĝin falos la malamikoj.

'14 Fusilo pendas ne plu sur mur' ; ĉar celos pafistoj tre spertaj ; malsekan barbon levas Nudul'* ; sopiras al predoj ofertaj.

'15 Unuan pafon jen Sinklar cel' ; li kriis kaj ĉesis spiri ; la skotoj vokis: Falis kolonel' ; nin Di' de l' danĝero tiru!

'16 Antaŭen kampuloj! Antaŭen norveg'! ; Disbatu, disbatu for! ; Sopiris skoto hejmen re ; li ne havis ridan humoron.

'17 Kadavrojn Kringon kvazaŭ lavango ; sufiĉe korakoj voros ; pro fluo ĉi de juna sango ; la skotaj knabinoj ploros.

'18 Vivanta hejmen venis neniue ; por al samlandano rakonti ; kiom danĝeras viziti tiujn ; loĝantajn en norvegaj montoj.

'19 Plu staras fosto en sama lok' ; niajn malamikojn minaci ; ho jen por ĉiu norvego provok' ; por vidon lian aŭdaci!)